

& Certe do okazos:

< Rekante 16 el 32 batoj por strofo, entute 224 paŝoj dum 3 minutoj. Norda Kantaro #5228. El sveda tradukis Kukoletto (2001).>

(#Melodio:

<1,8:2> (SO /Do3Do DoRe /Mi DoMi /So MiSo /do; MiSo /do3do doMi /SoSo SoMi /Re e /e e;Mi /Fa FaLa /dodo doLa /So SoMi /Do o;Mi /So3So MiSo /Fa3Fa ReTI /Do o /h)×7)+

(&Strofoj:

'1 Se /venos svati/ĝanto ha/zarde al /mi ; kio /certe do o/kazos, kredas /mi/ ; ne /rajtos li /veni en la /ĉambron ĉe /min ; pro/mesas mi al /panjo kaj al /vi/.

'2 Sed se li tamen venos en la ĉambron de mi (×:; **kion certe faros li, kredas mi ; ne rajtos li**) rampi en la liton ĉe min (×:; **promesas mi al panjo kaj al vi.**)

'3 Sed se li tamen rampos en la liton de mi brakumi min nek teni ĉirkaŭ mi

'4 Sed se li tamen tenas min kaj eĉ karesas min fari infanon en mi

'5 Sed se li tamen faros infanon en mi foriri kaj sola lasi min

'6 Sed se li tamen iras for kaj sola lasas min ; kion certe faros li, kredas mi ; li devos sendi monon per poŝto al mi

'7 Sed se ne sendos monon li per poŝto al mi ; kion certe li ne faros, kredas mi ; ja devos mi voki la helpon de polic'